1999 3

# KOMENCANTO

*gazeto por komencantaj aŭtoroj kaj komencantaj esperantistoj*



**Snejana Kononova** [Niĵnjaa Omka, Omska reg., Rusio]

redakcie — pasporta servo — gramatiko kaj distanco
aforismoj — antikvaj kverkoj — parodio — debuto el Kubo
krucvortenigmo — anekdotoj — someraj e-tendaroj
korespondu!

# KOMENCANTO

**1999 numero 3/ refondita en 1997/ 8 numeroj jare**
**redaktas kaj eldonas:** Viktor Kudrjavcev
**konstanta kunlaboranto:** Rafija Jafasova
**adreso:**
620041, Ekaterinburg, ab. ja. 132, Ruslando
**elektronika poŝto :** let@post.e-burg.su
**abontarifo** por 1999:
*internacia tarifo:*
24 nederlandaj guldenoj aŭ $12; *orienteŭropa kaj latinamerika tarifo:* $10; aŭ por ĉiuj — 15 IRK
**konto ĉe UEA:** vkud-a
*ruslanda tarifo kaj la rubla zono* . 54 рубля (за 8 номеров в год) простым почтовым переводом на имя Кудрявцева Виктора Васильевича: 620041, Екатеринбург, а. я. 132


# PERANTOJ
## de KOMENCANTO

*laŭ ĉi-subaj adresoj vi povas aboni nian gazeton*

AŬSTRALIO
Libroservo de AEA, P.O.Box 230 Matraville N.S.W. 2036.

ĈEĤIO
Vladislav Hasala, A.Dvoráka 1, CZ-696 62 Strážnice

ESTONIO
Virve Ernits, Mahla 65 — 1, EE — 0012, Tallinn

FRANCIO
Raoul G.Melo, 34, av de Russie, F-03700, Bellerive s/Allier

ITALIO, KROATIO, SLOVENIO
Viŝnja Branković, Via Leghissa 6, IT-34131 Trieste

KUBO
Lazaro Azcuy Ravelo, str. 25 #5611 c/56460 Playa 11300, HAVANO

POLLANDO
Maciej Wnuk, Skrytka 105, ul. Broniewskego 77-137, PL-01-865 Warszawa

SVEDIO
SEF, Lisbet Andréasson, Södra Rörum pl 455, SE — 24294 Hörby

SVISLANDO
Christoph Schaidegger, Im Schleedorn 6, CH — 4224 Nenzlingen

UKRAINIO
Dmitrij Cibulevskij, ab.skr. 9307, UA — 310003, Ĥarkiv

USONO
Ionel ONET, PO Box 1129, El Cerrito CA 94530

ĈINIO - vakas; BRAZILO - vakas; BRITIO - vakas; JAPANIO - vakas NEDERLANDO kaj cetera j - vakas;

# redakcie

Karaj legantoj!

Bonvolu taksi mem, kio rezultiĝis el la senfinaj klopodoj de la redakcio fari la gazeton pli kaj pli interesa.

En tiu-ci kajero vi trovos la finon de la rakonto pri "Pasporta Servo".

La Gramatika parto ĉi-foje estas malgranda, sed ni promesas en la proksima numero novan interesan turnon en nia gramatika ŝtuparo. Restintan liberan spacon de la paĝo 4 okupis AFORISMOJ.

La kvina paĝo — debutas nia abonantino el Moskvo *Valentina Zujeva* per la malgranda poetika noveleto pri la antikva kverka aleo en *Kolomenskoje*. Sampaĝe vi trovos parodion de *Ludmila Leksina* "Prokurora problemo", verkita je la sama litero "P".

Sur la sesa debutas esperantistoj el Kubo — *Lazaro Azwy Ravelo* kaj liaj lernantoj, inter ili, ŝajnas, nova desegnisto por nia gazeto *Victoriano Almenares Alaycon*. Sufiĉe komplika krucvortenigmo de *Oleg Demjaŝev* el Tatarstano.

La sepa paĝo enhavas nur anekdotojn, inter jam konataj tradukantoj debutas *Artur Ĥismatullin*. La oka paĝo krom la tradiciaj korespondderiroj enhavas anoncon pri la INTERNACIA ESPERANTO-TENDARO en Trebic, Ĉeĥio kaj Okcidenta SOVETIA ESPERANTISTA JUNULARA TENDARO OkSEJT-39 en Tiĥvin, Rusio.

*Snejana Kononova* el Nijnjaa Omka, (Omska regiono, Rusio), prezentis fajnan desegnaĵon por la kovrila paĝo, kiu nomiĝas "Printempo".

Kompare kun la pasinta jaro multe pli da desegnaĵoj aperas en "K". Pentro-aŭtoroj de la 3-a numero de "K": *Sergeo Kostromin*, Rusio; *Bill Thorne*, Anglio; lernanto de *Scilla Scoke*, Jugoslavio; *Victoriano Almenares*, Kubo.

GRAVAS! S-ro *Lazaro Azwy Ravelo* konsentis iĝi peranto de KOMENCANTO por Kubo!

## DANKON!

al:

***Juan José Veza Martin***,
(MADRID, Hispanio)pro 3 IRK kiel donaco por "K".

***Honore Lalanne***
(MORLAAS, Francio) pro 40 Fr.F kiel donaco por "K".

***Renee Triole***,
(La CIOTAT, France) pro 3 IRK kiel donaco por "K".

redakto-fino de "K"-4'99 la 1-a de junio

[Fino. Komenco en "K"-2'99]

ESPERANTO kaj TURISMO

# PASPORTA SERVO

### Kiel *ne* uzi la liston?

Ĝastigantoj volonte gastigos vin laŭ la menciitaj kondiĉoj, sed bonvolu ne misuzi la adresliston. Jam tro da gastigantoj malaliĝis, ĉar ĝenis ilin la ricevado de leteroj kiuj petas ĉiajn aferojn krom gastigado. Ne uzu la liston por korespondado, vendado, petado de mono aŭ entreprenaj proponoj. Bonvolu ne malhelpi al Pasporta Servo!

### NE por korespondado!

Pasporta servo ne estas listo de korespondpetantoj.

Multaj gastigantoj ĉagreniĝas kiam oni traktas ilian aperon en Pasporta servo kiel Peton pri korespondado.

Por korespondpetoj vi povas turni vin al *Koresponda Servo Mondskala*.

### NE por invitiloj!


Krome, gastigantoj ne povas aranĝi oficialan invitilon . Kiel individuoj, ili ne povas doni la necesajn garantiojn. Por invitilo vi kontaktu oficialan instancon aŭ organizon. Gastigantoj ankaŭ ne peras laborlokojn en sia lando.

### Kiel uzi la liston?

Serĉante gastiĝon oni sekvu la kondiĉojn de la gastiganto. Kelkaj gastigantoj pretas akcepti gastojn sen antaŭa anonco, aliaj postulas, ke oni antaŭe kontaktu ilin por interkonsento. Kelkaj postulas skriban peton, aliaj akceptas (ankaŭ) telefonan peton. En la listo kutime aperas indikoj pri tio, kiom da gastoj povas akcepti la gastiganto, kaj kiom longe la gasto(j) rajtas resti. Gastiganto principe devas akcepti gastojn kiuj agis laŭ la koncernaj indikoj en la listo.

Gastigado devas inkluzivi senpagan tranoktadon. Pri eventuala manĝado oni faru interkonsenton. Se oni interkonsentas ke la gasto manĝos ĉe la gastiganto, la gastiganto rajtas peti repagon de la kostoj faritaj por la manĝo de la gasto. Gastiganto ne devas proponi manĝojn; gasto tiukaze mem aranĝu siajn manĝojn. Gasto kompreneble ankaŭ povas proponi (prepari) manĝon por la gastiganto. Kaj komuna kuirado estas agrabla!.

**Pasporta Servo - 1999**
**nova rekordo**
**945 adresoj el 76 landoj!**



Krom precizajn informojn pri la dezirata gastigado, ĝentilas enmeti internacian respondkuponon (irk), aŭ du por aeropoŝta respondo. Internaciaj respondkuponoj haveblas en poŝtoficejoj (kvankam bedaŭrinde ne en ĉiuj landoj). Se vi skribas al pluraj personoj en la sama urbo, vi helpas al la gastigantoj se vi tion mencias. Kaj se pro ŝanĝoj en feriaj planoj vi tamen ne povos veni al iu gastiganto, estas dece almenaŭ tion sciigi laŭeble frue.

### Kiel ricevi la liston de gastigantoj?

Gastigantoj en la listo aŭtomate ricevas senpagan ekzempleron kaj do ne bezonas mendi ĝin. Preskaŭ ĉiu Libroservo disponas pri stoko da listoj, sed ĉiam eblas mendi rekte ĉe UEA aŭ TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo) laŭ la sama adreso:

**Nieuwe Binnenweg 176,**
**NL-3015 BJ ROTTERDAM,**
**Nederlando)**

Ruslandanoj kaj ekssovetianoj povas peti la Liston ĉe la redakcio de KOMENCANTO.

Ĝi estas sufiĉe multekosta, sed vere la posedanto profitos pli ol li elspezos!

Se vi aĉetas la liston, vi povas tuj ekuzi la servon. Vi povas senpage tranokti ĉe 871 gastigantoj en 75 landoj. Ĝuste tiom da landoj kaj nomoj troviĝas en la lasta eldono de PS-1998.

Se vi aliĝas al Pasporta Servo kiel gastiganto, *ĉiuj* profitas!

Vi profitas dufoje: vi ne nur povos akcepti interesajn Esperanto-gastojn en via hejmo, laŭ viaj propraj kondiĉoj, sed vi ankaŭ senpage ricevos la liston, kaj do ankaŭ povos senpage uzi la servon! PS ankaŭ profitas, ĉar pli granda listo signifas pli bona servo!

# GRAMATIKO kaj DISTANCO

*En la antaŭaj du numeroj ni rakontis pri la TEMPO, do tute nature venis la vico de DISTANCO kiel filozofia kaj praktika kategorio. Vi povas registri en vian notlibreton kaj en la kapon la sekvajn nociojn*

**DISTANCO** - longo de interspaco.

Ekzemploj, ilustrataj la nocion DISTANCO:
la distanco de la tero al la luno; la objekto estis jam en la distanco de dekkelke da paŝoj de ŝi; kelkan distancon pluen(z); tio kuŝas en granda, longa distanco de ni.

### Metra sistemo

**METRO** — unuo de longo en la *internacia metra sistemo.* Teorie unu metro estas egala al la dekmiliono de la kvarono de tera meridiano.
**decimetro** — 1/10 unu dekono de metro
**centimetro** — 1/100 unu centono de metro
**milimetro** — 1/1000 milono de metro
**mikrono** — 1/100 unu centono de milimetro
**kilometro** — 1000 metroj

### NeMetraj mezurunuoj

**futo** — 0,304 de metro (iom diversvalora laŭ la landoj, sed nur la angla estas ankoraŭ uzata )
**mejlo** — mezurunuo de longo por teraj vojaĝoj: romia mejlo - 1472,5 m; angla 1609,31m;
**mara mejlo** — 1852 m;
**versto** — rusa mezurunuo de vojlongeco 1067 m;
**arŝino** — rusa mezurunuo de longo 0,71 m;

**DISTANCO / TEMPO= RAPIDECO**
(km/h, m/s)



**Bill Thorne,**
[Londono, Anglio]

# AFORISMOJ

**Maksim Petrov**
[AKSU, Pavlodarskaja ob, Kazahio ]

*Ĉiu homo estas labirinto, en kiu batalas Tezeo kaj Minotaŭro*

**Stanislaw Borkowski**
[ RADOM, Pollando]
el la letero al la redakcio: *"Mi neniam povis eklerni kaj memori la vorton "eviti". Post kelkaj tagoj, por forte memori ĝin, mi hazarde faris aforismon:*

*Oni ne devas eviti laboron, ĉar laboro estas bono por la koro*

**Oleg Nekludov,**
[BUZULUK, Rusio]

*Potenco estas tiu tablo, de kiu neniu libervole foriras.*
(Fazil Iskander)

*Kiel plej rezulte venĝi al sia malamiko? Faru por li kiel eble multe da bono!*
(Epikteto, romia filozofo)

*Homo estas akcesora produkto de amo.*
(Stanislav Jeĵi Lec, pola verkisto)

**Stanislav Kacko**
[KURGAN, Rusio]

*Neniam preterlasu ŝancon prisilenti*

*Ni ĉiuj fariĝas infanoj, kiam trafas la fotelon de dentisto*

DEBUTO

**Margarita Zujeva,** [Moskvo, Rusio]

Per ŝia poetika noveleto pri la malnova apudmoskva urbeto *Kolomenskoje* ni daŭrigas la serion de rakontoj pri naciaj moroj, kutimoj, vidindaĵoj ks, kiun ni komencis en la numeroj 4'98, {"Festo de floroj" (*Ginette Martin,Marie-To Pierrel*, FRANCIO)} kaj 7'98 {"Festeno ĉe la brilo de la luno" (*Ann-Louise Akerlund*, SVEDIO)}.

# EN LA OMBRO DE JARCENTOJ



(pentris lernanto el la grupo de komencantoj-lernejanoj de **Csilla Csöke**, [urbo Mali Idoš, JUGOSLAVIO])

En unu el histori-valoraj lokoj de Moskvo, *Kolomenskoje*, estas la unikaj monumentoj de la naturo — kverkoj, la plej antikvaj arboj sur la teritorio de Moskvo.

Ĉi tiuj kverkoj havas pli ol 600 jarojn. Ek de la pompa envena pordego de la bieno komenciĝas la kverka aleo. Laŭ ĝi kaj poste dekstren oni povas veni al la plej aĝa el la kverkoj.

La giganto trankvile rigardas al vi el la abismo de jarcentoj kaj kvazaŭ konsilas iom malpli tumulti. Kiom multe da rigardoj kaj pensoj, ĝojaj kaj ne tre, glitis laŭ ĝiaj branĉoj kaj trunko dum tiom daŭra vivo.


En la profunda meditado rigardas ĝin aĝuloj kaj miras pri la rapidflueco de la tempo.

Junularo estas certe konvinkita, ke la maljuneco estas ne por ili, ke ĝi estos tiel fore. Jen du junulinoj kaj du junuloj, ridante, provas ĉirkaŭpreni la trunkon de la koloso per la ĉeno el la brakoj, sed vane — ok brakoj ne sufiĉas!

Iuj apogis sin al la kverko aŭ tuŝas ĝin — tiel la homoj ĉerpas fortojn kaj energion.

Por mi tiu ĉi kverko estas simbolo de tre maljuna aĝo, kiam la rondo de vivo, kredeble, mallarĝiĝas nur ĝis si mem. Ŝajne, ke jam nenio surprizas tiun raspan grandegulon, nur eble la maldikaj fleksaj plantidoj sur ĝia monolita malglata trunko, ĉar vivo daŭras.

---



pentris **Sergeo Kostromin,** K-Uralskij, Sverdl. ob., Rusio]

**Ludmila Leksina,**
[Sudja, Kurskaja obl, Rusio]

# PROKURORA PROBLEMO

(Politika polemika parodio)

Publicistoj, parlamentoj, partioj priparolas problemon: "Prokuroro plus putina paro". Publicistoj provokas: "Perverso persona? Paĵlohomo? Pajaco? Prokuroro perpleksis!" Parlamentoj persvadas: "Prokuroro povas private peki". Popol-patriotaj partioj proklamas: " Prokuroro pravis, pravas, pravos!" Popolo pagis, pagas, pagos... Pro putinoj por prokuroroj.

## La redakcia alvoko!

La redakcio de KOMENCANTO alvokas vin pli aktive reehi al la konkursoj. Temas pri la taskoj el K-2'99: rakontoj, kie ĉiuj vortoj komenciĝus je la sama litero kaj la rimaĵoj, kies ekzemploj estas sur la paĝo 5 (K-2'99). Ni invitas vin provi viajn fortojn kaj promesas, ke ĉiuj provoj aperos sur la paĝoj de nia gazeto.

## Debuto el Kubo

*"Kun plezuro mi legis vian leteron kaj gazeton KOMENCANTO. Mi montris ĝin al miaj lernantoj — ili entuziasmiĝis pri la gazeto, precipe plaĉis la rubrikoj "Gramatiko kaj ...", aforismoj, konkursoj kaj Korespondu.. Mi sendas kelkajn enigmojn, desegnaĵojn de mia lernanto Victoriano Almenures kaj adresojn por korespondi. .."*

*Samideane* **Lazaro Azwy Ravelo**, Havano, KUBO

## ABCD-vortenigmo

grupo, kiu iras la unua

a

neordinara kaj neatendita okazaĵo

diverskolora

b

komuna festa manĝo

meza punkto aŭ parto

c

centono de metro

percepti diferencon inter io kaj io

d


malkovri per intuicio




**Victoriano Almenures**, HAVANO, Kubo

# KRUCVORTENIGMO

**Oleg Demjaŝev**,
[p.k. 133, Nab.Ĉelni, Tatarstan, 423819, Rusio]



*horizontale*:

1. insekto, viktimo de kolektantoj en ĉiuj partoj de la mondo. 3. pigra besto, kiu preferas plej parte pendi sur la branĉoj de la arbo, loĝas en Suda Ameriko. 5. koko, taŭga al reproduktado. 7. kata parolado 9. antikvaj grekoj opiniis, ke tiu floro estas la plej bela. 11. bestino, kiu havis sep idojn kaj kiujn sukcese formanĝis lupo. 13. oficiala rajtiga dokumento (vaste uzata inter la bolŝevikoj dum la unuaj jaroj) 15. birdo, nigra kun griza dorso 16. kuirtabla kovrilo. 17 dolĉa aŭ acida trinkaĵo el fruktoj

*vertikale*:

1.oceana kankro(manĝebla) kiu havas ermitan vivmanieron. 2.. reptilio. 3. virina naĝkostumo. 4. arbusto kun tre bonaromaj printempaj floroj. 6. akva-sporta veturilo. 8. elefanta nazo-brako. 10. stepa, dezerta insekto, kiu aktivas nokte per brua krakado, cirpado. 11. "ŝipo" de dezerto. 12. metala kunfandaĵo, nomo de la urbo en nord-okcidenta parto de Rusio. 13. malgranda simio. 14. ruĝkolora legomo

respondoj al la krucenigmo de Tatjana Savina, K-21.vendredo 2.erinaco 3.tabako 4.eraro 5.rano 6.inko 7.nesto 8.akrido 9.regreso 10.ofensivo Divenita vorto — VETERINARO

# ANEKDOTOJ

**Artur Ĥismatullin**,
[Troick, Ĉelabinskaja obl., Rusio]

Kolonelo demandas la soldatojn:
— Kiu volas veturi al la milito ?
— Ni! - elpaŝas du kuraĝuloj.
— Bone. La ceteraj iros militi piede.

* * *

Sonoras telefono.
— Ĉu tio estas vi, amata?
— Ne, tio estas mi, — respondas la edzino.

* * *

Venas viro en la vendejon, vidas sur la breto staras io bela, aera, svelta. Li demandas la komizon:
— Diru, kio estas tio facila, svelta, aera?
— Tio estas jogurto!
— Jogurto!.. — admire reehas la viro kaj ekspirinte sin turnas al la komizo:
— Du botelojn da vodko, bonvolu.

* * *

Viro dungiĝas por laboro, oni lin demandas:
— Kion vi scipovas fari?
— Mi povas fosi.
— Kaj krom tio?
— Mi povas ne fosi...

* * *

**Viktor Alikin**, [Permo, Rusio]

Fiŝisto ĉe la rivero kaptas fiŝojn. La fiŝkaptado estas tre bonega, post la dudeka aŭ dudek unua fiŝo al la hoketo trafas la Ora Fiŝo.
— Lasu min! - petas ĝi. - Mi por vi plenumos tri viajn dezirojn.
La fiŝisto silente ĵetas la Oran Fiŝon en la sakon kaj grumblas:
— Kiuj, mildiable, povas esti deziroj, kiam mi havas tiom bonegan fiŝkaptadon!

* * *

**Oleg Nekludov**,
[Buzuluk, Orenburgskaja obl., Rusio]

Kirurgo diras al la riĉa paciento:
— Mi devas malĝojigi vin, necesas tranĉi vin ree.
— Kial do?!
— Ja mi... dum la operacio forgesis en via ventro mian guman ganton.
— Jen, prenu cent dolarojn kaj aĉetu por vi la novan.

* * *

**Valerij Ĥabarov**
[Gorjaĉij kluĉ, Krasnodarskij kraj, RUSIO]

En la lernejo
— Mia patro diras, ke en la vivo ĉiam estas pli bone doni ol ricevi! — diras Vovoĉka
— Tio estas bona viva principo! — laŭdas lin la instruistino, — kaj kio estas via patro?
— Li estas boksisto!

* * *




**Victoriano Almenures**, HAVANO, Kubo

# KORESPONDU!

Ĉiu kadro kostas 3 rublojn aŭ 2 Internaciajn Respondkuponojn
Por pagintaj abonantoj de 'X' - senpage

s-ino *Tania Roig Perez*
29 ja., korespondi tutmonde
46#3506 apt.6 e/ 35 y 37,
Playa 11300
HAVANO
KUBO

*Viktoriano Almenares Alaycon*
65 j.,kemia inĝeniero, emerito, pri div. temoj
str.25 # 5614 e/56y60,
Playa 11300, HAVANO
KUBO

*Yohania Ramos Mendozas*
24 jara studentino, pri diversaj temoj
str. 30 # 2109 e/23y21
Playa 11300, HAVANO
KUBO

*Annel Haehl*
53ja., pri ĉiuj temoj, paco, poezio
616 Illinojs
St. Lawrence,
KS 66044-23240.
USA

s-ro *Kavin Warburton*
24ja., pri historio, esplorado de kamparoj kaj junularaj temoj
1/3 William Street
Monington
NZ.9001 DUNEDIN
NOV-ZELANDO

*Alla Utkina*
17 jara studentino, pri kulturo, sporto, literaturo, foto, turismo
M-Sibirjaka, 51-61
LESNOJ, 624205,
Sverdlovskaja obl.,
RUSIO

*Amika Rondo Esperantista*
serĉas kontaktojn en la tuta mondo
Petofi Sandor ut.36,
HU-2921
KOMAROM-SZONI
HUNGARIO

s-ro *Tjong Hie Liem*
univ. profesoro, pri konfucianismo kaj klasika muz.
Dian Furnitore.
Depak 12 A
SEMARANG, Jawa
INDONEZIO

s-ro Oleg Nekludov
25ja., numismatiko, akvarioj, fervora esperantisto
2-17-77
BUZULUK, 461010,
Orenburgskaja obl.,
RUSIO

s-ro *Mehdi Moruzi*
pentristo kaj muzikisto, respondo garantiata
P.O.Box 838,
IR-81465
ESPAHAN
IRANO

f-ino *Rana Abedian*
28j., studentino, pri filmoj, muziko, arto kaj literaturo
P.O.Box 64815-439
ANDIMESHK
IRANO

s-ro *Jan Uldal Niemann*
fervojisto
P.O.Box 45, DK-3900
NUUK, via Danmark
GRONLANDO
DANIO

s-ro *Svaraj Chakravarty*,
serĉas korespondantojn por siaj gelernantoj
102/1c Karaya,
IND-700017
CALCUTTA
HINDIO

s-ro *Syam Sundar Pal*
disvastigo de Esperanto
30/19 Baruiparat,
Dalapukur,
IND-711104,
CALCUTTA-Havarah-4
HINDIO

s-ro *Joseph Alva*
pri filozofio kaj humanspirita vivo
Comalado 11
E-08032
BARCELONA
HISPANIO

s-ro *Thorsten Schiauch*
35ja., pri diversaj temoj
Marienstrasse 20
DE-76185
KARLSRUHE
GERMANIO

## SOMERA ESPERANTO-TENDARO

Klubo de Esperanto kaj de mondaj lingvoj de Theodor Kilian organizas ĉi-jare jam la 47-an Someran Esperanto-Tendaron. Ni instruas en la tendaro ne nur Esperanton, sed ankaŭ la anglan, francan, germanan kaj rusan lingvojn. Oni loĝas en 4 aŭ 5 litaj kabanoj, manĝas 5-foje dum la tago kaj pagas nur 170 DEM. La etapoj estas 14-tagaj. La 1-a komenciĝos la 4-an de julio.

Ni organizas ankaŭ refreŝigajn semajnojn. La 1-a komenciĝos la 26-an de junio, la 2-a ek de la 15-an de aŭgusto. La kosto, kiu inkluzivas loĝadon kaj manĝadon estas 125 DEM. Detalajn informojn vi ricevos ĉe :

ESPERANTO, CZ-674 01 Trebic, Ĉeĥa Respubliko

## KORESPONDI...

listo de dezirantoj korespondi enhavas pli ol 45 adresojn Sendu vian anoncon por senpaga enpresigo; aldonu 2 Internaciajn Respondkuponojn, se vi deziras ekzempleron. Lastan eldonaĵon vi ricevos sendante unu IRK aŭ 10 adresojn de seriozaj esperantistaj korespondemuloj el diversaj landoj.

R.MELO, 34, Avenue de Russie, FR.03700,
BELLERIVE S/Allier, FRANCIO

## OkSEJT-39 Okcidenta Sovetia Esperantista Junulara Tendaro

TIĤVIN, Leningrada regiono, RUSLANDO, 4-14 de julio 1999. 10 tagoj de mirinda vivo en la Verda Respubliko! Tre riĉa programo — kursoj, ekskursoj, konkursoj, bonega ripozo sur la naturo! Detalajn informojn petu ĉe: **Ruslando, 187500, Leningradskaja ob., TIĤVIN-6, a/k 2, SEJT**

N

